

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIROMUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR; 0,70 DOL; 2,15V.FR.

FMEYDM

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

LA INTERNACIA JUNULARKUNVENO EN GROET (Nederlando) (10-17 Aŭg. 1938)



Ĝis antaŭ kelkaj semajnoj mi ne sciis, kio estas junularkunveno internacia, sed ĉeestinte la Kunvenon en Groet mi ĝin scias. Jen kiel tio okazis. Aŭdinte, ke okazos junularkunveno en nederlanda vilaĝo apud la maro, mi decidis entrepreni la sufiĉe longan vojaĝon al Groet por ĉeesti. Ĉar mi disponis pri sufiĉe da libertempo mi iris kelkajn tagojn antaŭ la komenco de la kunveno al Groet por vidi la preparan laboron. Tio jam estis interesa, ĉar la aranĝoj por akcepti la gastojn estis iom ampleksaj. Kun gravaj mienoj laboregis la preparantoj, kiuj laŭŝajne apenaŭ konis unuj la aliajn. Estis varmege kaj nokte fulmotondris kaj pluvegis. Tio ne bone influis la animstaton de la farantoj de la preparaj laboroj, sed ili persistis. Post du tagoj, je la 10a de Aŭg. alvenis la unuaj „fremduloj”. Du francaj fraŭlinoj kun kiuj oni ne povis paroli holandlingve. Cetere oni ne multe parolis, ĉiuj laboris, ankaŭ la francinoj, kiuj venis per nekutimaj bicikloj kaj kiuj tuj post alveno lavis siajn ŝtrumpojn, kio tre mirigis kelkajn holandanojn, kiuj hazarde vidis tion. Ili iom stulte ridetis al la francaj fraŭlinoj kaj neniu kuraĝis libere paroli. La horoj pasis. Venis granda, forta holandanino, kiu iom senpacience demandis, ĉu ĉio estas preta. Jes, sinjorino, ĉio marŝas bone. La sinjorino malgraŭ tio dissendis amason da ordonoj kaj tiam la aferoj „marŝis ankoraŭ pli bone”. Jen ĝenerala konsterniĝo kaj maltrankvilo : la aŭtobusoj kun la „fremdaj” infanoj alvenis. Multaj el ili estis lacaj pro la longa vojaĝo kaj la varmo. Sed ili tamen alportis bruon kaj vivon. La gvidantoj kaj gvidantinoj helpis al la

infanoj trovi akvon kaj ĉion necesan. Jen alvoko por manĝi. Iru al la manĝejo. Ĉiuj ekiras. Longa viro krias : dekstre, dekstre sur la vojo. Kion li deziras? Ha, mi komprenas. Ni marŝis maldekstre sur la strato kaj en Nederlando ĉia trafiko iras dekstre. La longulo estas maltrankvila, li avertadas : dekstre! Kaj ripetas tion en kelkaj aliaj lingvoj. Ni iras ĉiuj dekstren. Neniu el la infanoj estas maltrankvila. Kial? Ili estas junaj kaj sentas la agrablan forton de propraj membroj post la longa sidado. Okazas nenia akcidento, ĉiuj eniris en la manĝejon. Kie estas la longulo? Ha jen. Li iom trankviliĝis kaj lia voĉo superas la bruadon en la manĝejo. Ĉiu silentas momenton. Ha bone. Ni manĝos. Post la manĝo preparo de pajlosako kaj cetero. Je la oka ni revenas en la manĝejon, kiu nun estas kunveno. Oni petas, ke ni kantu. Ni faras tion iomete, senkonvinke. Ni ankoraŭ ne estas „hejme”. Kelkaj salutparolas, inter kiuj protestanta pastro kun nomo Boeken. Aperas grupoj da infanoj sur la scenejo kaj prezentas dancojn, kantojn, deklamojn. Bone, sed tion mi jam vidis ofte. Ĉu tio estas Junularkunveno? Nu, mi vidu



morgaŭ. Ha, al la marbordo. Diable, kiom da dunoj estas ĉi tie! Ni promenadas inter kaj sur la dunoj, la vojo mola, la varmo grandega. Feliĉe, jen la maro. Ĉu ni rajtas naĝi? Jes, singarde, singarde. Ha, jen la longulo, kiu hieraŭ estis tiom tima sur la strato. Dekstren! Sur la marbordo estas nek dekstre, nek maldekstre. Al la maro, en la maron! Feliĉego! La freŝa akvo. La infanoj perdas ĉian premecon kaj retenemon. Laŭte kaj senzorge ili krias kaj bruas, saltas en la akvon kaj brue batas ĝin per piedoj kaj brakoj. Nun aperas ankaŭ la suno sur la vizaĝoj de la plenaĝuloj : ĝi estas rebrilo de la feliĉo, kiu radias de la infanmienoj. Ha, nun mi komprenas: tio estas Junularkunveno! Ĉiuj reiras al la manĝejo. De kie ĉiam venas la amasoj da pantranĉaĵoj, da lakto, da teo? Ĉion por ni preparigas la „granda sinjorino” kiun mi jam vidis pli frue. Ŝi instruas al la „laborgrupo” (ĉiutage aliaj plenumas tiun taskon) kiel oni laboras en kuirejo. Kaj nun aŭdu la bruon en la manĝejo! Hieraŭ la infanoj estis iom silentaj, sed nun! Kia gaja societo. Kaj manĝi, manĝi! Diable, kiu pagos tion! La sumo, kiun mi pagas por la kunveno estas ja nur tre eta. Mi diras tion al la „sinjorino de la kunveno”. Ŝi nur respondas kun feliĉa rideto : Manĝu kaj estu feliĉa kaj senzorga kiel infano. Nu, bone, for la zorgojn. Tagmeze mi migras apud la granda gimnastikejo en kiu nokte dormas pli ol cent knabinoj. Bela konstruaĵo.

Apude staras tendoj. Kaj jen sur la herbejo! Ha, tio estas bela! Kelkaj knabinoj ludas kaj dancas. Unu el ili kantas. Kiom rava tio estas sub la blua ĉielo. Kia vervo en la prezentado de tiu kanto! Jam nun : la fino. Voĉoj aŭdiĝas : Claire, Claire, kantu denove. Ree ŝi kantas. La „publiko” rekompencas per aplaŭdo. Dancoj, ludoj, kantoj : for estas la tagmezo. Manĝi. Kion ni ricevos? Ha, bongusta manĝaĵo : kamparano en la vilaĝo preparis ĝin. Hej, jen tion mi ne atendis. Kelkaj infanoj tamen alportas panon, ĉe la bona varma vespermanĝo. Nekompreneble! Ha, jen la klarigo : estas franca kutimo, ni ja estas en internacia kunveno, ne forgesu tion! Ĉeestas 9 nacioj. Kiaj gajaj tagmanĝoj! Knabino lerte ludas pianon. Ĉiu estas viveca. Kio okazas? Granda virino, verŝajne nederlanda, pelas kelkajn knabinojn el la kuirejo. Ŝi parolas nemulte esperante sed la vizaĝo kaj brakoj helpas. Voĉo aŭdiĝas : revenu hodiaŭ-vespere je la oka. Tio koncernas nin ĉiujn. Oni disdonas ricevitaĵojn leterojn. Trankvilo sekvas, escepte en la kuirejo : purigado de teleroj. Vesperprogramo : Longa viro pledas : Claire, vi kantis bele hodiaŭtagmeze, ĉu vi volas nun kanti kun ni? Iom ĝenite Claire konsentas kaj ekkantas : „En la mondon venis nova sento”. Ĉiuj ekstaras kaj plenvoĉe kantas la belan himnon kun ŝi. Nova vizaĝo sur la scenejo, serioza homo kun nigra hararo elegante prelegas pri „Esperanto kaj la Paco”. Estas S.ro Declaire, kiu parolas la seriozan vorton, sen kiu la Junularkunveno ne estus kompleta. Venas anglaj knabinoj kiuj deklamas komune „La Vojo” de Zamenhof. Bele, sed iom tro modeste. Tamen ili estas bela granda grupo, verŝajne la plej granda grupo. Aliaj kantoj sekvas. Bone. Venas kantgrupo el Koedijk. Ĉu tio estas lando aŭ urbo? Ne gravas. Ili kantas esperanto-kantojn. La gvidanto mem kantas en la grupo, li staras modeste inter, ne antaŭ la grupo. Kiu li estas? Mi aŭdas neelparoleblan nomon, skribe : Schut. Sekvas dancoj, kantoj kaj parolado de S.ro Glück, profesoro de la Cseh-Instituto. Li tre bele parolas pri Comenius kaj Zamenhof du eminentuloj. Tro rapide flugas la tempo.

Morgaŭ al Alkmaar per tramo, vidi la fromaĝvendejon. Vendredomatene. Mi vekigis iom post la sesa. Jam zumas kaj bruas la vivo ĉirkaŭ mi. El tendo, apud mia rampas juna homo. Do, li dormis en tiu malalta tendo. Ĉu vi dormis bone? mi demandas por esplori ĉu efektive oni povas dormi en tia tendo. La junulo turnas la kapon kaj montrante sian



kontentan vizaĝon li trankvile respondas : Mi dormegis en mia oportuna dometo! Estis al mi plezuro vidi tian kontentan homon kaj mi diligente prenis akvon por lavi min ĉar ni iros al urbo, al Alkmaar. El tendo kaŭre promenas S.ro Glück. Li deziras akvon, sed ne kuraĝas preni ĝin pro la knabinoj. Facila solvo : petu, ke unu el ili donu iom da akvo. Laŭte sonas la voĉoj de homoj el tiom da nacioj. Nenia fremdeco plu. Zamenhof ni dankas vin. Ni estas feliĉaj pro la harmonio, kiun kreas via lingvo inter ni. Kaj nun — al la manĝejo. Kia bruo! Muziko, kantoj, dancado. Kaj tio je la sepa kaj duona matene ! En kiu mondo mi vivas? Ha, mi komprenas : tio estas internacia Junularkunveno. La gajeco tiom influas ĉiujn, ke ne restas loko por ĉagreno. Kaj ĉiam denove min trafas la bela ornamo de la manĝejo. La flagetoj kaj flagoj, la belaj propagandiloj por „La Juno Vivo” de Meydam, la grandaj koloraj desegnaĵoj de Jekke van Dijk, la belaj proverboj de nia sveda amikino, Dagmar Lind, kia ornamo! Intertempe : manĝi, trinki teon, lakton kaj jen, foriro. Holandaj junuloj ludas buŝakordeon. Sonas pure en la frua, freŝa mateno. Jam ni atingas stacidometon. Antikva trajno fumante alruliĝas. Eniru. Kia pejzaĝo tra la fenestretoj. Jam Alkmaar. Ni promenas kun esperantoflago kaj muziko. Bona propagando. La fromaĝvendejo estas plenplena. Estas nun varmege. Fromaĝportistoj en blankaj vestoj kun helkoloraj grandaj ĉapeloj alkuras. Faru lokon, diskuru, la portistoj alvenas, rapidu, rapidu! Kaj super la brua ĥaoso la sonorilo aŭdigas la horon, supre el la turo. Aperas malgrandaj ĉevaloj alte sur la turo. Ĉiu silentas kaj rigardas. Hej, aŭdu: de la turo sonas la himno esperanta : „En la mondon venis nova sento”. Bonege! Belaj fraŭlinoj en nacia holanda vesto vendas fromaĝon. Oni pagas per holanda monero, malgranda, kaj ricevas multe da fromaĝo. Nebona negoco, bona reklamo. Kolektiĝu, kolektiĝu ! Jen la gvidantoj. Ili kondukas nin al la antikva trajneto per kiu ni atingas vilaĝon Bergen kun ludo-ĝardeno. Agrable sub altaj arboj. Ni trinkas limonadon kaj manĝas. Tempo por ripozo. Ripozo? Infanoj ne ripozas. Ili malkovras pianon. Muziko! Sub granda tegmento estas vasta dancplanko. Subite estas balo! Kia surprizo. Ĉiu alkuras kaj partoprenas en la ĝojo. Halto. La muziko silentas. Ĉu paŭzo? Ne, juna knabino kantos. Ŝi staras preskaŭ senmove, kvazaŭ ŝi preĝas. Nur la profundaj revemaj okuloj pruvas, kiel fortege batas en ŝia koro la vivo! Kaj tion ŝi esprimas per kantado. Kortuŝe, belege. Iuj diras : Marcelle vi kantas bele. Denove muziko, danco, fotografado. Ni formas kantĥoron sub gvido

de Claire Dupuis. S.ro Schut filmas. S.ro van Veenendaal deziras daŭrigon de la balo. Li brilas pro plezuro. Sed jam ni foriras, promenadas inter belegaj arboj. Belega estas la mondo, almenaŭ tie ĉi. Ĉe vojkruciĝo atendas nin la ĉie-estanta S.ro Bant. Li havas lakton por ni. Laŭtaj ĝojkrioj pro tiu bongusta surprizo. Trinko, filmo, ŝerco, antaŭen, ni iros manĝi. Manĝo, kanto, muziko en la festa manĝejo. Belege ludas Erna Matuschewska. Forta voĉo petas : silenton. Ĉiuj silentas. Bonan apetiton. Venis leteroj por multaj. Oni ankaŭ multe forsendas. En angulo de la manĝejo estas la „butiko kun poŝtoficejo”. Tie deĵoras la nelacigebla Jenneke, vendante poŝtmarkojn, kaj tiel plu. La programo diras : vespere liberaj promenadoj; tamen la festa kunvenejo estas tiom alloga, ke antaŭ la naŭa la salono estas plenplena. Multaj junuloj el Schoorl, Catrijp kaj Groet staras ĉe la pordo por vidi la esperanto-infanojn. Estas miriga grupo tiu internacia esperantista junularo. Kun aŭ sen programo ili havas ĉiuspecajn prezentadojn. Ni vivas dekfoje pli rapide ol ordinare. Tiom da spektakloj, spertoj, konatiĝoj.

Sabatomatene. Ni iras al la maro laŭ belaj vojoj. Jen la marbordo kaj la maro. Ni senvestigas nin en tendo, kiu laŭ onidiro apartenas al S.ro Brant. Efektive ĝi apartenas al alia sinjoro. Ne gravas. Oni facile pardonas al fremduloj. Nederlanda toleremo kaj gastameco. Post la naĝado kaj banado ni preskaŭ senintence formas grupon ĉirkaŭ S.ro Bant kaj Jenneke kun la infanoj el West-Graafthijk. Ili konas la melodiojn de ĉiuj kantoj el la kantaro de „La Juna Vivo”. Ĉiuj kantas. Jen : ĉenkanto. Tion mi neniam faris ĝis nun. Kiom agrabla estas la kantado sur la freŝa marbordo. Unu kanto sekvas la alian. Haltu! Admonas S.ro Glück, ni estu ĝustatempe en la manĝejo! Ĝenerala protesto. Kantu, kantu, volas la junularo. Junuloj kaj plenaĝuloj fervore kantas kun akompano de la eterna kanto de la maro. Fraŭlinoj Sheppard kaj Edwards atentigas pri la ekzercoj de la teatro- kaj kantgrupoj sabattagmeze, ĉar la oficiala kunveno akazos sabatvespere en Schoorl. La urbestro mem parolos al ni. Ne gravas. Ni kantas. Alvenas S.ro Schut kaj komunikas, ke li filmos nin ĉiujn malantaŭ la granda dormejo sur la herbejo. Tio efikas. Ni iras al la manĝejo, kie ni devas akcepti riproĉon de la „Sinjorino de la Kunveno” pro la malfrua reveno. Ni klinas la kapon sub la dolĉa riproĉo, kaj relevinte la kapojn ni montras la feliĉon, kiun ni trovis sur la marbordo. Tuj ni legas rebrilon de tiu feliĉo sur la mola, bruna vizaĝo de nia „Sinjorino”, kiu senprokraste pardonas la malfruan revenon. Post la manĝo ĉiuj

iras al la ludoherbejo, kie S.ro Schut kaj F.ino Gnirrep faros filmojn de la dancantaj knabinoj. Mi forgesas rigardi al la filmantoj pro la spektaklo, kiu sin prezentas antaŭ miaj okuloj. Ion tian mi neniam vidis antaŭe. La knabinoj el Kimrujo dancadas kun akompano de du fraŭlinoj Rees, kiuj kantas. Tian dancadon oni ne povas prezenti sur scenejo, almenaŭ ne kun tia efiko. La filmo montros ĝin tia, kia ĝi estis : bela, gracia kaj esprimoplena. Sub la blua ĉielo la prezentado estas simfonio de juneco, vicleco kaj harmonio. Jam sekvas aliaj dancoj. Francaj knabinoj kun F.ino Lepachelet prezentas popoldancon. Kiel elegantaj pupoj la infanoj dancas kaj gracie sin movas. La ĉeestantoj ĝojkrias, la filmaparato funkcias. Jen, soldanco kun muziko de Alison Boothroyd. Lerte kaj ritme la blankaj piedoj rapidas sur la herbo. Nenia hezito, nenia eraro. Kaj tio fakte nur estas ekzerco, ĉar vespere estos la prezentado. Alvenas juna skota kavaliro kun belaj vestoj kaj velura ĉapo. Estas Pat Morrison. Kia dancado! Pat tute ne movas la vizaĝon sed des pli multe la piedojn. Tiel danci povas nur junaj homoj. La dancmanio kaptas ankaŭ longan viron kun blanka ĉapo. Li imitas saltantan ranon. Strange, strange. Flanke staras la knabinoj el Bishop Auckland kaj deklamas. F.ino Edwards kaj S.ro Glück instigas al pli vigla dirado. Atentu : „La Vojo” de Zamenhof estas batalkanto, diras S.ro Glück, kaj emfaze li diktas : „Nurr rrekte, kurraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan!” Bone, li krias, pli forte. Vespere mi bone aŭdis la rezulton. Voĉoj aŭdiĝas : manĝi! Ha! jam nun! La sonĝe bela tagmezo pasis. Feliĉo estas, ke la filmo konservis por ni la rememoron.



Sabatvespere, la granda oficiala festvespero. Granda salono en Schoorl. Esperanto-flagoj kaj emblemoj ornamas la salonon. Ĉeestas inter alie la urbestro de Groet kaj Schoorl, lia moŝto Barono van Fritag kun kelkaj skabenoj. La salono estas plenega kaj varma. S.ro Bant malfermas la kunsidon kaj dankas pro la ĝenerala kunlaboro, precipe de la urbestro. La urbestro mem parolas al la kunveno nacilingve. Kion li diras? Venas traduko en Esperanto. La urbestro salutas nin kaj la urbestro ĝojas, ke ni elektis Groet kaj Schoorl por nia Junularkunveno. Ni estu gajaj kaj havu festecan libertempon, li diras, sed, li aldonas, ni neniam forgesu, ke ni kunvenis en la nomo de grandioza idealo, nome interfratigi la popolojn de la mondo. Bonege, S.ro urbestro. Tion ni neniam forgesos. Venis amaso da saluttelegramoj

kaj leteroj. Sinjorino van Veenendaal decidas legi nur kelkajn. La unua estas de Familio Zamenhof el Warszawa, bondeziro por la Junularkunveno. Tondra aplaŭdo. Saluttelegramo de la kongreso de I. E. L. en Londono, de la Cseh-Instituto en Arnhem. Venis multe pli, sed mankas tempo. Sino van Veenendaal nur mencias, ke ĉe estas naŭ naciaj lingvoj, nome la nederlanda, germana, ĉeĥa, kimra, pola, angla, bulgara, franca kaj flandra lingvoj estas reprezentataj. Nun salutas la kunvenon delegitoj de naciaj esp. organizoj kaj deziras sukceson al la Junularkunveno. Por danki al ĉiuj pro la afablaj vortoj kaj bondeziroj kaj por rememoro al la kreinto de Esperanto la Kunveno ekstaras kaj kantas plenvoĉe kaj kun granda vervo : „En la mondon venis nova sento”. La sentoj de la ĉeestantoj esprimiĝas per tiu ĉi kanto. Potence ĝi sonas kiel ventego kaj kiel sankta promeso por la estonteco.

Kaj nun la prezentadoj de la infangrupoj. La infanoj el West-Grafdijk prezentis : „La novaj vestoj de la Reĝo”, sub gvidado de Nelly Kool. Tre amuza komedio. La grupo de F.ino Sheppard prezentis „La ĉemizo de la feliĉulo”. Ankaŭ tio tre amuzis la Kunvenon. La francaj „pupetoj” dancis, same kiel Alison Boothroyd kaj Pat Morrisson. Erna Matuschewska prezentis polan dancon. Originalaj loĝantoj de Volendam en belegaj naciaj kostumoj kantis; kantis ankaŭ Marcelle Montagnon kaj Claire Dupuis. Fraŭlino Stien el Francujo tre bone deklamis spritan monologon kaj la kimraj knabinoj kun F.inoj Rees dancis kun la torĉoj. La knabinoj de Bishop Auckland vigle deklamis „La Vojo” kaj F.ino Edwards estis kontenta pri ili, do ni certe estas. Por danki al ĉiuj, kiuj tiom sindone kunlaboris la Kunveno dankis per elkora komuna kantado kaj tio estis la fermo de la Oficiala Vespero.

Dimanĉe venis multaj gastoj, okazis Diservo en la preĝejo de pastro Boeken kaj F.ino Sheppard legis en la preĝejo el la Sankta Biblio. Tagmeze la francaj knabinoj prezentis fabelon de Andersen: „Paŝtisto de porkoj”. Senkompare elegantaj estis la kostumoj kaj bonega la prezentado. Facile oni povus verki tutajn paĝojn pri tiu prezentado same kiel pri tiu de la infanoj el West-Grafdijk, kiuj prezentis : „Kion faras la patro, tio ĉiam estas bona”. Tiuj prezentadoj restos por ĉiam en la memoro, ankaŭ pro tio, ke ili okazis en belega dunvalo. Vespere kantas por ni bulgara sinjorino kun sia filino. Ili ne laŭte kantas, sed tamen oni aŭskultas al tia kantado. Ĝi vekas



rememoron pri la propra patrino. Denove ni spertas, ke ĉiu lingvo sonas bele (ili kantas bulgarlingve), se bonedukita homo ĝin uzas por transporti bonajn pensojn. La filineto foriras. La patrino kantas sola bulgaran kanton. Mi nur aŭdas la vorton „Valerino”, kies signifon mi ne konas. Kun streĉita atento ni aŭskultas kaj admiras la lertan manipuladon de la gitaro. Kia harmonio inter la voĉo kaj la instrumento. Ni dankas per brua aplaŭdo. Lumbildoj pre-
paris nin por la granda ekskurso je lundo tra Nord-Holando. Mi ne klopodos skizi per kelkaj vortoj tiun ekskursegon. Ĝi valoris la plenan sumon de la aliĝmono al la Junularkunveno, kaj indus apartan verkaĵon.

Sed jam nun mi devas nepre mencii la viziton dum tiu ekskurso al la laktaĵfabriko en Stompetoren, kie laboristoj gvidis nin tra la fabriko kaj parolis al ni esperanton. Kaj provizore mallongan dank-
vorton al la esperantistoj el Volendam, kiuj akceptis nin kaj kun



flago nin kondukis tra la fama fiŝista urbeto kaj eĉ tra unu el la muzeo-similaj dometoj. Belege! Tion oni nur vidas unufoje dum sia vivo, almenaŭ se oni havas la feliĉon partopreni en tia ekskurso.

Kaj en Bovenkarspel, kie la esp. grupo el Enk-
huizen nin gvidis tra la bulbovendejo de firma Bakker kaj klarigis la sistemon de bulbo-aĉetado per elektra lumaparato. La infanoj estis la bulbo-
komercistoj kaj ricevis dekon da bulboj, se ili haltigis per butono la montrilon de la elektra vendilo sur la ĝusta cifero. Kelkaj gajnis tiun premion kaj la aliaj ne estis ĵaluzaj, ĉar firmo Bakker malavare donacis al ni mil bulbojn por divido inter la infanoj. Bonege! Ni kore dankas.

Marde ni lastfoje iris al la marbordo kaj vespere okazis la adiaŭa kunveno. Ĉiuj grupoj kaj solprezentantoj denove venis sur la scenejon. Kelkaj kun tute nova programo, eĉ venis novaj artistoj, inter kiuj la malgranda Hans kun rakonto kaj senparola artisto S.ro Berresford. La profetaj vortoj de D.ro Zamenhof : „La popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian” efektiviĝis en la Junularkunveno en Groet. Tute libere oni konversaciis, nenia fremdeco restis inter la partoprenantoj. La komuna kantado estis kvazaŭ modelo por ĉiuj kunvenoj kaj en la mezo de tiu brua vespe-
ro, kiam la ondoj da entuziasmo trakuris ĉies koron kaj la tuta festsalono estis kvazaŭ ŝaŭmanta maro, jen aperas Julius Glück kaj esprimas per belaj frazoj la dankon de ni ĉiuj al la organizintoj

de tiu ĉi interfratiga festo, al la geedzoj van Veenendaal. Ankaŭ F.ino Edwards diras dankvortojn al la organizinton kaj ŝi diras al longa viro, kiu sidas senceremonie sur la rando de la scenejo, ke li estas laŭ angla gusto : a jolly good fellow. Kaj jen oni malkovras S.inon van Veenendaal en la plenplena salono. Ŝi devas iri al la scenejo. Ŝi ne povas paroli pro la ovacio kiun oni faras al ŝi, ĉiuj ekstaras kaj laŭ instigo de F.ino Edwards la entuziasmo sin esprimas per komuna kanto. Nur tiam oni iom kvietiĝas kaj S.ino v. Veenendaal afable dividas ĉiun honoron kun F.ino Sheppard, kiu pasintan jaron aranĝis ion similan en Anglujo. Laŭ peto de la infanoj nun sekvas balo. Erna el Polujo, ludas pianon, S.ro Bant violonon kaj jen la juna popoloeto dancas. Eĉ sur la scenejo estas dancantaj knabinoj, kiuj dancas Lambeth Walk (Lambeta promeno). Lastmomente venas junulo el Groet ne-esperantisto sur la scenejon kaj dankas en la nomo de la loĝantaro kaj precipe de la junuloj, ke tiu bela junularkunveno okazis en Groet.

Karaj legantoj mi finas. Mi scias, ke mi forgesis multon, sed vi scias, ke estis neeble rememori ĉion. Okazis amasoj da interesajoj. Eĉ mi ne menciis la vortenigmojn de la infanoj el Birmingham, la grandan flagon, kiu flirtis de 8-metrojn alta masto. La grandegan esperanto-stelon mi ne menciis. Ĝi estis tute farita el Floroj kaj ses viroj apenaŭ povis porti ĝin. Sed sufiĉe. Mi nun scias, kio estas Internacia Junularkunveno, organizita de „La Juna Vivo”. Kaj nur unu deziron mi havas. Ĉeesti la venontan Kunvenon en Belgio. Ĝis revido!

Ĉeestinto.

komunikoj

En jenaj lokoj oni jam starigis sekcioj de T. J. O. :

Sevens Sisters (Anglujo) : 9 anoj; Birmingham (Anglujo) : 25 anoj;
West-Grafdijk (Nederlando) : 19 anoj; Leerdam (Ned.) : 7 anoj.

La estrarano S.ro Bant komencis instrui la lerneajn infanojn en Groet. Lernilo estas la Internacia Lernolibreto „La Juno Vivo”.

Kiu deziras lui la filmon pri la kunveno en Groet rapidu, ĉar jam multaj petoj envenis! Adr. filmservo : S.ro Schut, instruisto, Koedijk (N. H.), Nederlando.

ALIGU AL T. J. O.

Sekretariejo : F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam (Nederlando).

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝironumero : 330139.

DONACOJ POR T. J. O.

F.ino L. en Somain (Francujo) : guld. 7,50; F.ino R. en Seven Sisters (Kimrujo) : guld. 6,30; F.ino C. en Birmingham (Anglujo) : guld. 2,37 1/2; F.ino E. en Bishop Auckland (Anglujo) : guld. 25; F.ino S. en Birmingham (Anglujo) : guld. 15; S.ro M. en Birmingham (Anglujo) : guld. 4.50. Entute guld. 60,67 1/2.

Por komencantoj.**TIMO KAJ TOMO.**

Timo : Kion vi faras, Tomo?

Tomo : Nenion, kaj vi?

Timo : Mi venis por helpi vin !

CHAIQUE, Zagreb (Jugosl.)

St. FRANC.

PACIENCO.

Du veturigistoj renkontas unu la alian ĉe mallarĝa ponteto. Neniu el ili deziras flankeniri, do ambaŭ haltas. Unu el ili kviete prenas ĵurnalon el la poŝo kaj komencas legi. Tio tamen tute ne senpacienigas la alian. Ĝoje li krias : „Tuj kiam vi estas preta, bonvolu transdoni ĝin al mi!”

LA KUKOLO.

Kukolo parolis kun sturno, kiu venis el la urbo. Ĝi demandis la sturnon : „Kion oni parolas pri niaj melodioj? Kion oni parolas pri la najtingalo?”

„La tuta urbo laŭdegas ĝiajn kantojn”, respondis la sturno.

„Kaj pri la alaŭdo?”

„La duona urbo admiras tiun kantistinon.”

„Kaj pri la merlo?”

„Ankaŭ pri ĝi oni kelkfoje aŭdas laŭdantajn voĉojn.”

„Kaj kiel oni taksas min?” fine la kukolo demandis scivole.

„Ĉi tion mi tute ne scias”, redonis la sturno indiferente, „ĉar neniu parolas pri vi”. Jen la kukolo tre koleris, forflugis kaj de tiu tempo li mem vokas sian propran nomon ĉiam kaj ĉie, por ke oni aŭdu pri li.

Sch. GERM.

Rerakontis J. W.

Respondu al jenaj demandoj :

Kiuj parolis kune? De kie venis la sturno? Pri kio la kukolo informiĝis? Ĉu oni ŝatis la najtingalon en la urbo? Kiujn birdojn oni ankaŭ laŭdis? Kion la kukolo fine demandis? Ĉu la respondo estis favora al la kukolo? Kial la kukolo ĉiam krias sian propran nomon?

KNABINO EL STRUTOVO. (Sudafrika fabelo)

Iam vivis malriĉa viro laŭ nomo Mobilo. Li havis nek edzinon, nek infanon kaj li loĝis sola en sia kabano, malproksime de aliaj homoj. Li nutris sin per legomoj kaj kampaj musoj. Eĉ lia vesto estis farita el musfeloj, ĉar tie ne ekzistis aliaj bestoj, kiujn oni povus ĉasi.

Foje ĉasante musojn, Mobilo trovis ovon de struto, kaŝita en verda arbeto. Ho, tio estis granda feliĉo! Ion pli bongustan li de longe ne havis. Li prenis la ovon kaj atente portis ĝin al sia kabano. „Tiun ĉi bongustaĵon mi manĝos kiam venos pli malbona vetero”, pensis li kontente. „Tiam mi ne bezonos iri eksteren kaj serĉi ion, ĉar mi jam havas manĝaĵon hejme.”

Sekvantajn tagojn li, kiel ĉiam, iris mus-ĉasi. Sed vespere, veninte hejmen kun kelkaj malgrasaj musoj, li pro embaraso ne sciis kion diri. En la kabano li trovis por manĝado kovritan tablon kun diversaj bongustaj manĝaĵoj kaj kruĉon de ŝaŭmanta gren-trinkaĵo — „ubsjuvalu”.

„Hm”, meditis Mobilo, „tie ĉi aspektas kvazaŭ mi havus edzinon, kiu zorgas pri mi. Kion povas signifi tio? Mi nenion komprenas!”

Tiel pensante li manĝis kaj trinkis, kaj ĉio bonege gustis al li. Venonttage li denove iris musĉasi. Kiam proksimiĝis la vespero, lin komencis turmenti scivolemo, ĉu ankaŭ hodiaŭ lin atendas la surprizo? Kaj efektive! Ĉio estis tiel same, kiel la antaŭan vesperon.

Sekvantajn tagojn ĉio ripetiĝis; kaj li jam komencis alkutimiĝi, kvankam ne sciante, kiu tiel kore zorgas pri li.

Iun vesperon, kiam li pli longe, ol ordinare, restis maldormanta, en la angulo de la kabano ekaŭdiĝis stranga bruoj, kvazaŭ io eksplodis. Kaj subite Mobilo, ne kredante al siaj okuloj, ekvidis, kiel la strutan ovon eliris bela, juna knabino. Ŝi aspektis tiel aminde, ke Mobilo tuj demandis al ŝi, ĉu ŝi konsentas iĝi lia edzino. „Volonte, sed vi devas promesi al mi jenon — se vi iam eĉ estos kolera je mi, vi neniam rajtos min nomi „knabino el strutovo”.

Mobilo ĝoje promesis plenumi ŝian deziron kaj en la eta kabano komenciĝis feliĉa vivo.

Iun vesperon, antaŭ sunsubiro, la edzino demandis lin : „Aŭskultu, Mobilo, ĉu vi dezirus fariĝi gvidanto de granda armeo?”

„Ho jes! Volonte”, ĝoje ekkriis Mobilo. La edzino leviĝis, proksimiĝis al la fajrujo kaj per bastoneto kirlis la cindron. Post tio ili

iris dormi. Venontan matenon, kiam Mobilo vekigis, li ekaŭdis ekstere multvoĉan bruon kaj blekadon de brutaro. Forpelinte dormemon, li konstatis, ke la malgranda kabano aliformigis je bela, granda kastelo. Ĉe lia lito kuŝis luksa vestaĵo. Rapidege vestinte sin, Mobilo iris al la korto, por esplori, kion signifas tiu bruado. Sed apenaŭ li montriĝis en la korto, tuj eksonis salutkrioj de soldataro :

„Hura! Vivu nia kuraĝa gvidanto!” Nun Mobilo komprenis, ke ĉio ĉi estas faro de lia edzino kaj li amis ŝin ankoraŭ pli forte. Ili vivis tre feliĉe, ĉar nun ili havis potencon kaj riĉaĵon. Sed iun tagon Mobilo trinkis tro multe da biero kaj vino kaj ne plu komprenis kion li parolas. Kaj kiam lia edzino ne tuj alportis postulitan manĝaĵon, li kolere nomis ŝin „knabino el strutovo”, forgesinte ŝian veran nomon. „Kion vi diris?” timeme demandis la edzino, ĉar ŝi esperis, ke la edzo misdiris. „Kion mi diris? Ĉu vi ankoraŭfoje deziras aŭdi? Bone, tiam mi diras, ke vi estas nur simpla „knabino el strutovo”. Ŝi nenion respondis, sed Mobilo ekdormis profunde. Sed kion li ekvidis vekiginte la sekvontan matenon?! Li kuŝis sur nuda tero, lia luksa vesto malaperis kaj anstataŭ ĝi, li trovis sian malnovan muspelton.

„Kion signifas tio?!” ekkriis li. „Edzino, edzino! Kie do restis vi? Ĉu vi ne aŭdas?” Sed neniu respondis, lia amata edzino malaperis por ĉiam. Ĉirkaŭe regis morta silento. Ankaŭ de la armeo kaj de la brutaro restis nenia postsigno. Kiam li leviĝis por eniri ĉambron, li mire ekvidis nur sian malnovan, duone detruitan kabanon.

De tiu tempo Mobilo denove vivtenis sin per musoj kaj varmigidis sin per muspeltoj.

Riga (Latv.).

Esperantigis : Judith KRIEVS.


KIU METIS LA MANON SUR LA ĈAPELON ?

Iu kamparano perdis sumon da mono kaj neniel oni povis eltrovi la ŝteliston. La vilaĝanoj venis kune por serĉi kaj unu el ili diris : „Mi scias proverbon, kiu diras ke la ĉapelo de la ŝtelisto brulas. Ni nur rigardu ĉirkaŭe kaj ni vidos, ke la ĉapelo de la ŝtelisto brulas.”


Sen-pripense unu ĉeestanto metis sian manon sur sian ĉapelon kaj tuj ĉiuj sciis ke li estas la ŝtelisto.

F.ino REES (Kimrujo).

TOLSTOI (trad.).

ĈIAM GAJA.

Ĉiam gaja! Ĉiam gaja! Ĉiam gaja dum tuta tag'



Hej hop! mi estas ja, ĉiam gaja, ha, ha, ha!

Granda rondo, en kiu kelkaj knaboj saltas dekstren.

I. Ĉe la fino de la ripeto ĉiu haltas antaŭ knabino.

II. Frapi la manplatojn.

III. Danci (salteti) maldekstren. Ĉe la ripeto danci dekstren.

Tiam la knabinoj restas interne de la rondo, la knaboj ree helpas formi la rondon.

KANTO DE LA GROET-TENDARO.

Entute ni ricevis 13 melodiojn. Tiun de S.ro Dolinsky oni opiniis plej bela, sed bedaŭrinde mankis la melodio por la rekantaĵo. La gvidantoj preferis la muzikon de S.ro C. da Roscha Leal, sed la junuloj plej ofte kantis la melodion de S.ro de Korte el St. Maartensdijk (Nederlando).

JUNULARO FORMU RONDON.

Por ĉi kanto ni ricevis 5 melodiojn. Oni elektis du, nome de S.ro Ses de Kok (Deventer, Ned.) kaj S.ro Otruba (Tešetice, Ĉeĥosl.). Se eble ni enpresigos ambaŭ melodiojn.

LA SAĜA KOKO.

Fredĉjo iris kun sia patro al la kamparo por pasigi tie sian ferion.

„Kial do la koko ĉiam krias, paĉjo?”

„La koko, mia knabo, ĉiufoje krias kiam la homo diras mensogon”.

„Tamen kial jam je la 3-a en la nokto ĝi krias, paĉjo?”


„Pro tio, ke oni tiam presadas la matenĵurnalon, Fredĉjo.”

El „Radiaro”.

Subtenu la Tutmondan Junularlaboron !

ENIGMOJ

x . . . rimeno ĉirkaŭ la talio
 . x . . . frapo
 . . x . . la plej racia estaĵo
 . . . x . . adverbo
 . . . x . . cifero
 . . x . . duobla ĝemo (elkrio)
 . x . . . malseka malpuraĵo
 x vivas en la akvo
 Stompetoren (Ned.). J. MEESTER.



La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale : 1. fajrujon; 2. havigi al si; 3. impreson de surprizo; 4. la plej malgrandan parton; 5. personan pronomon 6. vokalon.

Spiŝ. Nova Ves. (Ĉ.S.R.). J. HARGAŠ.

LA SOLVOJ EL No 1.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 15 novembro.

L
 p o r
 d e n t o
 L o n d o n o
 ŝ t o n o
 a n o
 o

2. Koto — tolo — lodo — doko.
 La premiojn gajnis : J. Streefland, Leiden (Ned).,
 S.ro Evans, Manchester (Brit.).

KONVERSACIO.

En vagonaro en Parizo sidas du sinjoroj en kupeo.
 Unu el ili komencas paroli : Ĉu mi ne vidis vin pasintan semajnon en Genevo?"

„Neeble,” diras la alia, „mi tiam ne estis en Genevo.”

La unua sinjoro : „Ankaŭ mi ne estis tie. Certe estis du aliaj personoj!”

Lasta sciigo de la filmservo :

La filmo pri la Internacia Junularkunveno en Groet estos luebla nur **post 15 Oktobro**. Luprezio 2 guld. por unu vespero kaj por ĉiu sekvonta tago po 1 guld. La poŝtĉekkonto de S.ro Schut estas 310334, Koedijk.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson ne pli grandan ol du linioj.

Ĉeĥoslovakujo : 15-jara studento dez. kor. per leteroj, il. poŝtk. kun la tuta mondo. Vera Lhotskà, Praha-Liben, Podvini 73.

Francujo : G. Guérinot, Instruisto, La Houssaye, Seine et Marne, dez. kor. kun sovetia esperantisto pri socialaj temoj.

Nederlando : S.ro Th. de Bruin, Nobelstraat 83B, Rotterdam-C., dez. kor. kun la tuta mondo pri ĉiu temo. Respondo garantiita.

Nederlando : Kursanoj (lab.) en Hoorn dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. Adreso : M. v. Essen, Wydenes (N. H.).

Nederlando : Al ĉiu, kiu sendos al mi muelejo-karton de sia lando, mi sendos muelejo-karton pri mia regiono (ankaŭ al nederlandanoj). E. v. Walsum, W. Kinderdijk 86, Alblasserdam.

Svisujo : Ok infanoj, proks. 14 jaraj, lernantaj Esp. dez. kor. kun junuloj en la tuta mondo. Kinderheim Traugott, Herrliberg (Zch.).

Francujo : Mr. Murlon G., 116 rue Charles Keller, Nancy (M. M.), dez. kor. per poŝtk., leteroj, kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

Svedujo : S.ro K. E. Johanesson, Solgården, Lund, dez. interŝ. poŝtmarkojn kaj diversajn monerojn de la tuta mondo.

ANONCETOJ.

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Scheldestraat 65, Amsterdam-Z.

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Libretoj 32-36 paĝoj po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimenon. Mendebla al „La Juna Vivo”.

KANTU DUM LA GRUPVESPEROJ! Ne plus diru : ni ne havas komunajn kantojn. „La Juna Vivo”-kantaro enhavas 34 kantojn kun muziknotoj ! Aĉetu nun! Prezo po 35 cendoj, 2 ekz. por 50 cendoj !

„La LINGVO ESTAS MODELA, VERE ZAMENHOFA STILO...” Jen kion „Pola Esperantisto” diras pri la Internacia lernolibro „La Juna Vivo”. Ĉu vi ankoraŭ hezitas uzi en viaj kursoj tian taŭgan kaj malmultekostan lernilon? Petu tuj specimenon! Prezo : 20 cendoj. Ĉe mendo de almenaŭ 20 ekz. prezo 16 cendoj plus afranko.

ATENTU! IO NOVA! En la monato oktobro 1938 aperos „La Granda Familio”, monata gazeto por la tutmonda esperantisto, 8-paĝa, formato de ordinara tagjurnalo. La nur-legado de la unua numero certe instigos al tuja abono. Petu senpagan specimenon ĉe la red. : C. Franzmann, Groesbeek, apud Nijmegen, Nederlando.

FUNDAMENTA KRESTOMATIO, unu el la plej gravaj verkoj en la Esperanto-literaturo, kiun ĉiu esperantisto nepre konu. La libro enhavas krom 31 ekzercoj el „Ekzercaro” multajn legendojn, interesajn rakontojn, anekdotojn, lingvajn kaj sciencajn artikolojn, belegan kolekton da poemoj de niaj plej lertaj esperantistaj poetoj.

SILKA LEGOSIGNO, kun enteksita portreto de nia Majstro, kies vizaĝo kaj subskribo aperas klare sur la blanka fono. Dimensioj 15 × 5 cm. Prezo : belg. fr. 5 (0,30 guld.) plus afranko. Mendebla al „La Juna Vivo”.

ATENTU

Ekde 15 septembro la prezoj de la binditaj jarkolektoj de „La Juna Vivo” estas jenaj : jarkolekto '34/35, 55 c.; jarkolektoj '35/'36 kaj '36/'37 : po 45 cendoj, plus afranko. Ĉi prezoj nur validas ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. Unuopaj ekz. kostas 55 c. kaj 65 c., plus afranko.

ADRESSANGO.

La svisaj abonantoj bonvolu atenti, ke la nova adreso de nia peranto, S.ro Dasen, estas : St. Jean 17, Genève.

HEROLDO DE ESPERANTO La semajna organo de la Esperanto-movado



„Mia plej regula kaj plej ŝatata gasto...” — „Mia fidela amiko, kiun mi ne volus malhavi...” — „La ĉefa fonto, el kiu mi ĉerpas ĉiam novan entuziasmon kaj fervoron por nia movado...” — „Mian saluton al Heroldo, kiu estas ĉiusemajna sunradio en malpaca kaj malbona epoko...”

TIEL SKRIBAS AL NI NIAJ
LEGANTOJ KAJ AMIKOJ!



HEROLDO DE ESPERANTO Scheveningen (Nederlando)



La eldonejo liveras 2 provnumerojn kaj kompletan katalogon de libroj kontraŭ unu respondkupono.

Aliĝu al la TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

Jarkotizo, enkluzive
„La Juna Vivo”
por anoj kaj subtenantoj :
1 gld.; 2 ŝil. 3 p.; 20 fr. fr.;
17 belg. fr.

Kun vera ĝojo ni eksciis ke
je la 4-a de oktobro
edziniĝos nia kara amikino

NORA SHEPPARD

kun

Pastro W. B. HARRISON

Ni deziras al ili ĉion bonan.
Estonta adreso : 23, Clara Rd.
Woose, Bradford, Yorkshire,
(Anglujo).